

en HEERLEN.

1982

Tradicie, sed foje pli tre agrable renkontiĝis en HEERLEN samideanoj el belga, nederlanda kaj germana limregionoj, ankaŭ el Antvereno kaj el flandra limburgo.

Ĉirkaŭ centoj da esperantistoj alveturis por partopreni tiun unutan tagon bone aranĝitan amikecan kaj kulturalan programon.

S-ro Peters kaj la lokaj esperantistoj estu dankataj !

Gesinjoroj Bossong, el Eindhoven prezentis lumbildojn pri Sovecia respubliko UZBEKIO. Nur belegajn vidojn el tiu sunlando ni admiris.

Ni vizitis nome Taŝkenton (taŝ = ŝtono kaj kent = urbo, en uzbecka lingvo) jam faman, kiam konkeris ĝin Aleksandro la Granda.

En SAMARKANDO, sciencurbo kun la observejo de Ulug Beg (XV jarcento), en BUKHARA, sankta urba centro de la muzulmana religio, kies famiĝis la civilizacia pasinteco, en la fekunda valo de FERGANA, ni plenplenigis nian memoron, kiel per orientaj fabelaj vidaĵoj.

Ankaŭ pri la nuntempa vivo tie klarigis la prelegintoj, kiuj substrekis, kiom grave disvolviĝas industrio kaj agrikulturo, kiom intensa fariĝas la kultura kaj arta vivo, kiom instruita fariĝis la antaŭe preskaŭ komplete analfabeta enloĝantaro per modernaj, grandskalaj edukadrimedoj inkluzive je universitata nivelo kaj en scienca serĉado.

Ili same raportis kiom da monsumoj elspeziĝis tie ankaŭ por protekti, savi kaj riĉe restaŭri la nekalkuleble altvalorajn monumentojn el la orienta historia pasinteco: moskeoj, palacoj, k.t.p....

Ili priskribis la vivmanierojn kaj emfazis la progreson, nome koncerne la emancipon de la virinoj !

Eĉ ne mankis personaj humore rakontitaj vojaĝanedkdotoj de tiu lerta paro da esperantistoj, kiel tiu, kie S-ro Bossong skandalis pro tio, ke li vestiĝis per ege mallonga sportpantalono... tuthazarde ekzakte simila al tiu per kiu sin intime subvestas la muzulmanaj virinoj...! Pro tio ke S-ro Bossong ankaŭ havis longan hararon, loka policano en niformo alkuris de fore, supozinte, ke iu loka edzo eble forĵetis sian edzinon preskaŭ tute nudan surstraten...! Por surprize konstati, ke nur temis pri simpla malpeze vestita nederlanda turistino!

LA MUZEO de Heerlen.

Promenante, ni vizitis ankaŭ la arkeologian muzeon, kie, ki sciivoleme rigardis la elfositaĵojn kaj la bone konservatajn restaĵojn de antikva romia banejdomo. Por interesituloj pri estontaj vizitoj en la koridoroj de la muzeo, funkcias robotoj, kiuj por unu guldena monero rakontas en diversaj lingvoj, la muzean historion.

LA LABORKUNSIDO

Dum la laborkunsido, decidiĝis, ke la proksima 3-landa renkontiĝo okazos oktobre en Düren, Germanie.

Pri Aubel, : S-ro Pol Denoel raportis pri sia funkcilaboro en la Provinca Esperanto-Ateliero de Aubel. Sukcesplene aliras 10 gelnantoj oficialajn provincajn diplomojn, kiujn ili ricevos dum oficiale organizata ceremonio far la Provincaj aŭtoritatuloj, la 19-an de junio en Aubel mem ! La pordogardisto.